

# LA LAMPIRO


61-a jaro, numero 163, 2020: 3



EASP inaŭguras serion  
da virtualaj prelegoj

# Machado de Assis

Fiere sin prezentas al la esperantistoj!




**Titolo:** Postmortaj rememoroj de Brás Cubas  
**Tradukis:** Paulo S. Viana  
**Eldonejo:** EASP, 2019  
**Formato:** 21 cm, 248 paĝoj

**Prezo:** R\$ 35,00



**Titolo:** Esav kaj Jakob  
**Tradukis:** Paulo S. Viana  
**Eldonejo:** EASP, 2019  
**Formato:** 21 cm, 272 paĝoj

**Prezo:** R\$ 35,00



**Titolo:** Dom Casmurro  
**Tradukis:** Paulo S. Viana  
**Eldonejo:** EASP, 2019  
**Formato:** 21 cm, 260 paĝoj

**Prezo:** R\$ 35,00

# LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 163, 2020: 3

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

**Grafikaranĝo:** Cristovão Rocha Sousa

**Revizianto:** José Roberto Tenório



*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj*

### Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

### Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca

05041-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183

easp.org.br | contato@easp.br

### Jarkotizo por 2020

Simpla membro.....R\$ 150,00.

Subtena membro.....R\$ 300,00.

Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

### Dejoroj:

Sabate: 9h - 12h

Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo Alencar Lima

**Vicprezidanto:** Paulo Sérgio Viana

**1-a Sekretarino:** José Roberto Tenório

**2-a Sekretarino:** Sidnéia da Conceição Beall

**1-a Kasisto:** Conceição Rodrigues

**2-a Kasistino:** Maria Delza Macabu

**Propaganda Direktorino:** Genildo Martins

Coelho

### Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj José Mauro Progiante

### Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

# ENHAVO

7

Akvarelo

18

Mi ne Taŭgas por  
Fremda Lingvo

28

TVaerj denove  
aktiva!

12

Easp inaŭguris  
serion da virtualaj  
prelegoj

22

Lingvaj Respondoj

29

Librorecenzo

13

Laŭdo al  
Enterigistoj

23

Novaspeca Homaro,  
Ĉu?

30

Ĵokero

14

Ĉu virusoj kaj prionoj  
estas vivantaj  
organismoj?

25

Se vi estas humana,  
vi kompatas

LA

Lampiro



## Paroloj de la prezidanto

Karaj geesperantistoj en la ŝtato San-Paŭlo, membroj aŭ ne de EASP: ni estas ĉi tie por atenti pri vi. La pordo de nia asocio estas malfermita al vi ĉiuj, por viaj proponoj, por viaj ideoj, por nia Esperanto-movado. EASP estas nur perilo por unuiĝo inter ĉiuj, por Esperanto.

Ni repensu pri la idealo de Zamenhof, pri unuiĝo de popoloj, pri paco, pri frata kunvivado. Ni estu familio, kiu uzas Esperanton.

Eĉ plej simplan ideon sendu al ni, ĉar ĝi estas por ni grava. Mi pensas, ke ĉiu samideano povas kunlabori. Mi fidus vin kaj esperas, ke ni iros al komuna celo, grava en nia nuntempa mondo. Ne vana estos nia agado. Helpu nin, alproksimiĝu al ni, permesu ankaŭ, ke ni venu al vi. Per unuiĝo, ni plifortigu nian kulturon. Mi kore dankas vin.



## Paroloj de la redaktoro

Jen La Lampiro sendas al vi salutojn el izoliĝejoj! Aŭ, se vi preferas, el kvarantenejoj! Interalie, por montri, ke malgraŭ la kronviruso, ni plu laboras. Kaj ni esperas, ke vi ĉiuj, EASP-anoj, sanas en viaj hejmoj, bonkondute.

Ĉi tiu numero kompreneble enhavas iom da tekstoj pri la nuntempa universala temo: la pandemio. Mi esperas, ke vi ankoraŭ ne estas saturitaj de tiu temo.

Certe avantaĝoj aperas dum ĉi tiu tempo de distanco inter ĉiuj. Interalie, ĝi taŭgas por montri, ke ni povas starigi interesajn, fekundajn kontaktojn per la reto. Tiel malfermiĝas eblecoj por alproksimigi niajn membrojn en la interno de nia ŝtato inter si kaj kun la samideanoj en la ĉefurbo. Interreto estas valora rimedo - ni uzu ĝin! Se vi tion spertas, tiam raportu al ni pri viaj aventuroj en interreto, lastatempoj! Eble tio inspiros aliajn geamikojn.

Bonan legadon!

# Akvarelo

## ANTONIA SOBRAL

*La magia arto pentri per kolora akvo*


*“... Varia, pasia kaj ribelema, akvarelo estas pentra tekniko, kiu permesas esprimplenajn kaj delikatajn rezultojn. Ĉu ekzistas io pli homa ol tio?”*

- Stephanie Boechat, brazila artistino

*Ekspozicio “Virinoj” - Stephanie Boechat*

**L**a vorto akvarelo devenas de la litala vorto acquarella (acquerello) kiu estas la diminutivo de akvo (acqua), kaj tiel esprimas la ideon akveto, pluveto.

Oni devas konsideri tri difinojn por la vorto akvarelo:



\*Kiel pentr-artaĵo, ĝi estas artaĵo farita per akvarelaĵ koloriloj.

\*Kiel koloriloj, ĝi estas diafana.

\*Kiel pentr-arta tekniko, per farbo, solvebla en akvarelo oni uzas akvon

kaj akvon kun iom da araba gumo, farbojn el koloraj pigmentoj.



La akvarelaĵ farboj troviĝas plejofte en ujoj kun sekaj diverskoloraj tablojdoj. Sed oni povas ilin trovi ankaŭ kiel duonhumidajn kapsulojn

aŭ, laŭ iliaj ĉefaj elementoj, kiel gumon kaj likvan konsiston. Estas du metodoj:

Malseka, kiam oni malsekigas la

por prilabori. Tamen pentri bone per akvarelo postulas trejnadon kaj praktikadon. Troveblas antaŭaĵoj en la ĉina kaj japana kulturoj, kiuj regis la teknikon pentri per akvo.



Tri antikvaj ĉinaj pentraĵoj - akvareloj sur silko

pentrotan surfacon antaŭ ol komenci pentri. Ĉikaze spontaneeco kaj rapideco tre gravas dum pentrado. La rezulto povas surprizi eĉ la verkiston. Seka, kiam oni malsekigas la penikon per miksaĵo de akvo kaj farboj. Ĉikaze oni celas fajnman perfektecon kaj pli difinitajn detalojn.

Akvarelo estas tre antikva tekniko, kies apero supozeble rilatas al la invento de papero kaj penikoj el kunikla felo, ambaŭ aperintaj en Ĉinio antaŭ pli ol 2000 jaroj. Uzata en la antikveco por pentri diversajn materialojn, kiel paperon, ŝtofon, ledon, tolon kaj kanvason, la tekniko estas konsiderata unu el la plej facilaj



Akvarelo de John White Secoton (indigena vilaĝo) - ĉ. 1585



Multaj civilizacioj uzis pigmentojn en akvo por registri elementojn de siaj kulturoj.

La vojaĝantoj tra la tempoj elektis akvarelon kiel preferatan teknikon por la plejmulto de la registroj en vojaĝlibroj, pro la minimuma materialo bezonata por portado kaj ankaŭ pro la ebleco transskribi specifan etoson de la vidaĵoj.

Ne nur vojaĝantoj, sed ankaŭ naturistoj, scienculoj, aventuristoj portas en sia sako malgrandan farboskatolon por portreti la mondon per sia observemo kaj arta sentemo.



Albrecht Dürer, Saliko-Muelejo - 1498

Konsiderata la unua granda majstro de la akvareltekniko, ĉefe koncerne la reprezentadon de pejzaĝoj.

Pro la produktado de altkvalitaj paperoj en la 18-a jarcento, la unua nacia lernejo de akvareloj aperis en Britio. Tiel ĝi estis disvastigita tra Eŭropo kaj rekonita kiel "Angla Arto". Ĉi tiu tradicio komenciĝis per topografiaj desegnaĵoj en epoko antaŭ fotado. Tiam aperas nomoj kiel Alexander Cozens, la poeto-

pentristo William Blake, John S. Cotman, Peter de Wint kaj John Constable, inter aliaj, sed estis sendube William Turner kiu plej bone esploris la akvarelajn eblecojn.



Panorama akvarelo de anonima pentristo (vidu ĉin tion pligrandan bildon en la fino de la artikolo)

Parto de la urbo Salvador, ŝtato Bahia, Brazilo – 18-a jarcento

Komence de la 19-a jarcento, pentristoj prenis siajn akvarelilojn kaj iris laŭvole por pentri. Solvante la farbon per peniko plena de akvo, ili kreis belajn pejzaĝojn. La artaĵoj sekiĝis tuj kiam la akvo elvaporigis kaj la pentristoj povis porti siajn verkojn ĉien. Tiel la akvareloj iĝis tre popularaj tutmonde pro siaj brileco kaj travidebleco.




William Turner, Brulanta Ŝipo - ĉ. 1830

Multaj famaj pentristoj fariĝis konataj pro la kapablo majstri la akvarelan teknikon. Jen kelkaj abstrataj akvareloj de la 20-a jarcento:



Paul Cézanne, La Ponto de Tri Saltetoj – 1906

Li estis unu el la plej influaj artistoj de la 19-a jarcento kaj respondeca pri la apero de kubismo



Emil Nolde, Ĵonkoj – 1913

Li estis unu el la unuaj ekspresionistoj, kaj estis unu el la unuaj akvarelaj pentristoj de la frua 20-a jarcento

Laŭ la tempopasado, la akvarelaj pentraĵoj eksuferis antaŭjuĝojn, ĉar oni ekkonsideris ilin kiel simplajn manfaritaĵojn, nenecesan teknikon kaj tre virinan por la moroj de certa epoko. Tiel, granda kontraŭdiro ekestis ĉirkaŭ tiu tekniko. Estimata de iuj, miskomprenata de aliaj,

akvarelo eĉ estis vidata kiel porinfana lerneja metodo.



Wassily Kandinsky, Unua abstrakta akvarelo - 1913


Li estas konsiderata la pioniro de la abstrakta arto



Akvarelo kun geometriaj elementoj – 1928

Nuntempe oni diras, ke ĝi estas necesa por tiuj, kiuj volas lerni aliajn

pentrajn teknikojn, ĉar ĝia praktikado implicas la protagonismon de akvo, elemento malfacile manipolata, postulante subtilecon kaj zorgon en la plenumado. Fine, estimata de multaj, akvarelo estas vidata kiel tekniko en si mem kaj eĉ uzata en projektoj de arkitekturo, ĝardenoj kaj urbaj pejzaĝoj. ■



Panorama akvarelo de anonima pentristo  
Parto de la urbo Salvador, Ŝtato Bahia, Brazilo – 18-a jarcentoj



Marc-Allante, Rajdu la Fulmon – Nuntempa akvarelisto

# Easp inaŭguris serion da virtualaj prelegoj

**PAULO SÉRGIO VIANA**

**E**ĉ katastrofa pandemio povas produkti favorajn fruktojn. Pro la monda sankrizo, en kiu la urbo San-Paŭlo okupis tragikan pozicion, la sidejo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo restis fermita dum kelkaj monatoj, en ĉi tiu unua semestro de 2020. Kiel ĉiuj scias, tio kaŭzis cunamon da eventoj per interreto, en la tuta mondo. EASP akompanis tiun bonan ondon. En la lasta sabato de la monato aprilo, je la 17-a horo, la vicprezidanto Paulo S. Viana elsendis per sia kanalo en Youtube duonhoran prelegon sub la titolo: “Pandemio kaj la Esperantomovado: perdoj kaj gajnoj”. Centoj da vizitantoj aperis dum lia prezento, kio signifas multe pli grandan publikon ol tiu, kiu ĉeestas ordinarajn ŝtatkongresajn prelegojn, ekzemple. Oni tamen devas plibonigi la organizon de tiaj iniciatoj,

ekzemple per faciligo por demandoj kaj komentoj je la fino de la prezento (ne nur per paralelaj skribaĵoj). Pro la granda sukceso de tiu unua provo, la estraro de EASP planas organizi pliajn similajn prezentojn.

Je la 31-a de majo, José Mauro Progiante brile prelegis per “zoom” pri “La defio verki por infanoj”. Multaj samideanoj reagis per demandoj kaj komentoj, en bonega interreta etoso.

Ni esperas, ke niaj membroj el la interno de la ŝtato sin prezentos por prelegi. Se vi konsideras vin preta por tio, bonvolu kontakti nian prezidanton Alencar Esmeraldo. Tamen ni memoru, ke ni devas eviti, pro statutaj devoj, polemikajn religiajn aŭ politikajn temojn. ■

# Laŭdo al Enterigistoj

**CÉLIO F. MARTINS**

**E**n ĉiuj partoj de la mondo kaj ĉiuj epokoj de la Homa Historio, ĉiam ludis gravan rolon la enterigistoj, la tombistoj, kiel herooj, riskante siajn vivojn kaj sanon kaj de ties familianoj kaj amatoj. Nevidataj laboristoj, kiuj neniam laciĝas, kaj, kvankam ricevantaj malaltajn salajrojn, ne strikas... Ili nur fosas la grundon kaj en ĝin metas, monotone kaj metode, la kadavrojn, milionojn da ili, bilionojn...

Ĉu vi iam partoprenis entombigon de tombisto? Ĉu ili neniam mortas? Mistero... Ekde la komenco de la jaro 2020-a, ili laboradas ankoraŭ multe pli, la tutan tagon kaj kelkfoje eĉ nokte.

Ordinare ili fosas denove la saman lokon, post kelkaj jaroj, por preni la ostajn

restaĵojn, tiom karajn al la parencoj de l' mortinto. La parencoj pensas, ke la mortinto ankoraŭ "vivas" interne de tiuj ostaĵoj...

Oni danku la tombistojn pro ties grava laboro! Oni almenaŭ rimarku, ke ili ekzistas! Oni valorigu ilian laboron! Oni preĝu, favore kaj fervore, por ilia sano kaj de ties familioj kaj amatoj. Dio fortikigu iliajn naturajn imunajn defendojn, tiel ke ili ne malsaniĝu kaj efike kontraŭstaru ĉiajn ajn malsanojn. Ili kaj iliaj familianoj kaj amatoj, havu vivon plenan je ĝojo kaj plenan je materiaj akiroj ankaŭ.

Oni preĝu por ili, ĉar "iam" ni ankaŭ bezonos iliajn servojn. ■




# Ĉu virusoj kaj prionoj estas vivantaj organismoj?

FRANCISCO S. WECHSLER

**K**iam ni alfrontas mondskalan epidemion de gripo kaŭzatan de kronviruso, denove incitas nin la demando: ĉu virusoj estas vivantaj organismoj? Jen malsimpla demando kun malsimpla respondo. Niajn antaŭulojn ne zorgigis tiu demando. Ili kredis, ke vivaj fenomenoj esence diferencas de la materiaj, ĉar ili enhavas ian nefizikan elementon aŭ estas regataj de principoj malsamaj ol tiuj regantaj nevivajojn. Alivorte, ili kredis pri *vitala forto* nereduktebla al fizikaj fortoj.

*Vitalismo* do estis la plej prestiĝa naturscienca doktrino ĝis la mezo de la 19-a jarcento. Multaj sciencaj eltrovoj iom post iom pruvis, ke vivuloj konsistas el la samaj substancoj kaj principoj kiel nevivajoj. Tamen, ĝis la eltrovo de virusoj kaj, pli malfrue, de prionoj, oni rigardis la linion apartigantan vivulojn disde nevivajoj kiel klare difinitan. Tiu linio iom post iom stompiĝis.

En 1892 Ivanovskij priskribis nebakterian kaŭzanton de la mozaikmalsano de tabakplantoj. En 1898 Beijerinck ripetis la




Kronvirusoj atakas homaran ĉelon - mikroskopa fotarto

eksperimentojn de Ivanovskij kaj pruvis, ke la infektanto, kiun li baptis *viruso*, kapablas reproduktiĝi kaj multobliĝi en ĉeloj de tabakplantoj.




La sana tabakplanto kaj la mozaikmalsano de tabakplantoj

Stanley sukcesis kristaligi ĉi tiun viruson en 1935, kaj pruvis, ke ĝi plu restas aktiva eĉ post kristaliĝo. Fraenkel-Conrat and Williams pruvis



Dmitri Ivanovsky (1864-1920)


en 1955, ke purigita ribonukleata acido (RNA) el tabakviruso kaj ĉi ties proteina kovraĵo spontane kuniĝas por formi funkciantan viruson, ĉar tia strukturo estas



Elektronika microscopia foto de tabakviruso

la plej stabila.

Ĝis nun, oni jam detale priskribis pli ol 6000 speciojn de virusoj, sed kredeble ekzistas milionoj da virustipoj ankoraŭ ne studitaj. Virusoj estas troveblaj ĉe preskaŭ ĉiuj ekosistemoj de la Tero, kaj estas la plej multnombraj biologiaj estuloj.



Komparo de la difraktaj X-radiofotografioj de fibroj de DNA en la (A) agordo (maldekstre) kaj translokigu RNA (dekstre).

Molekula vida zomo de la supra por (DNA foto de W. Fuller, kaj M.Spencer; kaj RNA-foto de G. L. Brown, 1963).



Martinus Beijerinck (1851-1931)

Virusoj ekster ĉeloj aŭ neinfektantaj ĉelojn estas sendependaj unuoj, kiuj konsistas el genmaterialo, alivorte molekuloj de desoksiribonukleata acido (DNA) aŭ

RNA, kiuj enkodigas la formiĝon de la virusaj proteinoj; el proteina kovraĵo, kiu ĉirkaŭas kaj ŝirmas la genmaterialon; kaj kelkfoje ili ankaŭ havas eksteran graskovraĵon. Ĉelo infektita de viruso estas devigata produkti milojn da perfektaj kopioj de tiu viruso.

En 2002 Cello kaj kunlaborantoj unuafoje sukcesis ĥemie sintezi infektokapablan viruson. Surbaze de la jam precize konata RNA-strukturo de la viruso, kiu kaŭzas infanparalizon, ili sintezis tiun RNA per pure laborariaj metodoj. La eksperimento detruis la ĝistiaman aksiomon, ke multobliĝo de virusoj




Wendell Meredith Stanley (1904-1971)

dependas de funkcianta genaro, kiu regas la procezon de multobliĝo.

La aŭtoroj tiamaniere pruvis, ke virusoj estas ĥemiaj estaĵoj, kiujn eblas sintezi surbaze de

publikaj datenbazoj.

Infektado kaj sinreproduktado ankaŭ povas okazi eĉ sen nukleataj acidoj,



Elektronika mikroskopa foto: kronviruso atakas ĉelon ĉe proteinoj nomataj prionoj. En la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento Gajdusek pruvis, ke eblas transdoni kuruon, progresivan nervomalsanon, de homoj al ĉimpanzoj; la kaŭzo ŝajnis ia nekonata infekta organismo. En la 60-aj jaroj Alper kaj Griffith hipotezis, ke tiu infektanto estas proteino. En 1982 Prusiner anoncis la izoligon de tiu hipoteza proteino, kiun li nomis *proteinhava infektopova ero* aŭ *priono*. Poste oni pruvis, ke samtipa proteino ankaŭ ekzistas ĉe

neinfektita ĉelo; la diferenco konsistas en tio, ke la strukturo de priono estas misa, kompare al la normala proteino. Prionmolekulo kapablas kuniĝi al la responda normala proteino kaj difekti ĉi ties



Fraenkel-Konrat (1910-1999)

strukturon, do generante kopion de si mem. Ĉi tiu difektopovo estas la meĥanismo, per kiu prionoj reproduktiĝas. Ĝis nun oni jam izolis prionojn kapablajn infekti plurajn animalojn, plantojn kaj fungojn.

Ĉu do eblas rigardi virusojn kaj prionojn kiel vivantaj organismojn? La respondo dependas de onia koncepto pri vivo. Laŭ populara difino, vivuloj estas



Robley C. Williams (1908-1995)

*malfermitaj aŭ kontinuaj sistemoj*, kiuj subtenas *homeostaton*, tio estas, emon al konstanteco de fizikaj kaj ĥemiaj ecoj. Plie, vivuloj konsistas el *ĉeloj*; havas *vivociklon*;

*metaboligas*, tio estas, transformas materion kaj energion, rezultigante konstruon kaj malkonstruon de





Maldekstre al dekstre: Jeronimo Cello, Eckard Wimmer. Dr. Benjamin Hsiao, kaj Sean Boykevich, 2002, pri sintezi infekto kapablan poliomjelitan viruson

ĉelenhavo; kapablas *kreski, adaptiĝi* al sia medio, respondi al *stimuloj, reproduktiĝi kaj evolui.*



Daniel Carleton Gajdusek (1923-2008)

kapablas tion plenumi nur ene de infektitaj ĉeloj.

Virusoj multobliĝas, sed ne kreskas. Ili ne kapablas metaboligi, kaj dependas de metabolado okazanta en infektitaj ĉeloj, kiun ili superregas.



Daniel C. Gajdusek (1923-2008)

Ili suferas mutaciojn kaj kapablas

interŝanĝi genojn, tiel evoluante kaj fariĝante pli adaptitaj al ĉelmedioj. Ili kapablas respondi al stimuloj kaj teni homeostaton



Tikvah Alper (1909-1995)

. Do virusoj havas kelkajn, sed ne ĉiujn karakterizojn de klasike difinitaj vivuloj.

Prionoj ne havas ĉelojn nek genojn, ne kapablas metaboligi, sed estas tre stabilaj kaj rezistemaj (fakte multe pli ol virusoj aŭ ĉeloj) kaj kapablas produkti kopiojn de si mem, sed nur



Stanley Pruisner Medicina Nobel-premiito 1997

ene de ĉeloj kaj difektante la strukturon de samtipa proteino. Ili ankaŭ suferas mutaciojn kaj naturan selektadon, tiel adaptiĝante al novaj medioj.

Konklude, virusoj kaj prionoj ja havas kelkajn karakterizojn de klasikaj vivantaj organismoj, sed ne aliajn. Ili situas inter klasikaj vivuloj kaj senvivaĵoj.

# Mi ne Taŭgas por Fremda Lingvo

LEANDRO ABRAHÃO, BRASÍLIA

*"(...) lingvon lingvano neniam mastras ĝis vere plena posedo, kaj nova instruero povas sin prezenti en artikolo de revuo kaj en ĉapitro de libro."*

Geraldo Mattos

“Mi ne taŭgas por fremda lingvo”: jen tre ordinara diraĵo.

**K**ial oni tion asertas al si mem? Nu, la motivoj estas tre diversaj. Gravas, ke per ĉi tiu artikolo vi eltrovos kaj espereble konvinkigis, ke jes, ankaŭ vi estas tute kapabla regi alian lingvon krom via denaska.

## Flua esprimkapablo

La t.n. flua esprimkapablo absolute ne signifas la povon esprimi ĉion en iu lingvo.

En la libro *La Defio de la Lingvoj* Claude Piron, ties aŭtoro, mencias la jenan okazintaĵon. En la jaro 1993 japana junulo turistis en Usono. Estis vespere, kaj li promenis en la ĉirkaŭaĵoj de strikte gardata loko. Iu gardisto, kiu prenis lin por vagabondo ekkris “Freeze!” (kio signifas “haltu, ne moviĝu!”). La junulo ne komprenis tiun slange diritan ordonon kaj paŝis plu,



malgraŭ, ke li kapablis sufiĉe bone elturniĝi anglalingve. Jen la gardisto alpafis lin.

## Eŭropa referenckadro por lingvoj

Helpe de ĝi oni povas mem taksisian lingvonivelon je ajna lingvo (aliru la retejon edukado.net kaj serĉu la kadron)<sup>1</sup>. Ĝi formas la bazon ankaŭ de la novtipaj lingvoekzamenoj de UEA.

En Esperantujo ankoraŭ ne disponeblas la C2-ekzameno, nome la plej alta nivelo en la kadro, sed jam de pluraj jaroj disponeblas la nivelo C1. Ĝi estas sufiĉe populara. Eblas trapasi ĝin ĉiujare, ekzemple kadre de Universala Kongreso de Esperanto.

Eble vi demandas vin, kiu estas la diferenco inter tiuj du plej altaj lingvoniveletoj. Nu, plej unue kaj antaŭ ĉio, regi lingvon je nivelo C2 ne signifas, laŭ la Referenckadro, egaligi sin al denaska parolanto de iu lingvo. Regi lingvon je tia nivelo ankaŭ ne signifas la povon ĉion esprimi.

Jen, laŭvorte, kio legeblas pri la parolkapablo je nivelo C2:

*Mi kapablas senpene partopreni en ajna konversacio aŭ diskuto kaj mi bone regas idiomaĵojn kaj parol-turnojn. Mi kapablas paroli flue, bonstile, distinge esprimante ankaŭ delikatajn nuancojn. **Mi kapablas, se mi blokiĝas, rekomenci kaj rekompili mian parolon tiel, ke la blokiĝo***

**APENAŬ rimarkeblas.** (miaj elstarigoj)

Komparu ĝin kun tio, kio legeblas pri C1:

**Mi kapablas esprimi min kontinue kaj senstumble, malofte serĉas vortojn kaj esprimojn.** *Mi kapablas uzi la lingvon flekse kaj efike en diversaj sociaj kaj jakaj kontaktoj. Mi kapablas precize esprimi miajn pensojn kaj opiniojn; mi kapablas ligi miajn alparolojn al tiuj de la parolpartneroj.* (miaj elstarigoj)

Estas plej evidente, ke en ambaŭ niveloj iam kaj iam vortoj mankos. Je la nivelo C1 mi *malofte serĉas ilin...* Tamen mi serĉas, kaj tio estas tute verŝajne rimarkebla por mia interparolanto. *Serĉi vortojn* signifas eksilenti, pli aŭ malpli longe cerbumi, iafoje movante la okulojn tien, kie en via kapo bildiĝas tio, kion vi volas esprimi. Anstataŭ silento, kelkfoje povas ankaŭ aŭdiĝi i.a. "ummm", "aaaaa".

Rimarku, ke spite tian *vortoserĉadon* vi, laŭ C1 nivelo, *kapablas esprimi vin kontinue kaj senstumble.* Kion signifas kontinue kaj *senstumble* se ne *flue*?

Ankaŭ je nivelo C2 okazas tiaj *blokiĝoj*. Ĉe la ekmanco de vorto aŭ esprimo vi bezonas cerbumi kaj trovi alian manieron esprimi tion, kion vi deziras. Tamen, je tiu nivelo la strebo estas *apenaŭ rimarkebla*, se ne *tute* nerimarkata kelkfoje, mi dirus. Malgraŭ la blokiĝo, laŭ la nivelo C2 vi *kapablas senpene partopreni en ajna konversacio aŭ diskuto kaj bone regas idiomaĵojn kaj parol-turnojn.*

La kapablo paroli flue per iu lingvo signifas esprimi sin ĉirkaŭirante blokiĝojn ĉe la vojo pli, malpli aŭ tute nerimarkeble por via interparolanto (fluanta rivero estas tute preciza bildo). Ju pli nerimarkeble, des pli flue vi parolas.

**Unue: vi bezonas bildon pri flueco**

Kion vi celas per via lingvokapablo? Se via celo estas iam pasigi en Novjorko viajn somerajn feriojn kaj ĝui senpere du aŭ tri teatraĵojn ĉe Broadway, vi tute certe ne bezonas scii anglalingve priparoli atomenergion aŭ la teorion pri kvantumaj partikloj, ĉu?

La demandoj estas: Kiam pasos tiuj ferioj? Ĉu post du, tri jaroj? En kiu monato precize? Ĉu iu vojaĝos kun vi? Kiu aŭ kiuj? Kiun aŭ kiujn teatraĵojn vi deziras ĝui? Kaj, plej grave, kiun vortprovizon vi laŭcele ekposedu por glate aŭdi kaj kompreni la parolojn de la aktoroj?

La respondoj al tiuj demandoj konsistigos tion, kion mi nomas bildo pri flueco. Sen ĝi vi plu baraktados pri tio, kion signifas flueco. Vi lernos, lernos kaj havos la impreson, ke kiom vi lernas, tiom ne sufiĉas, ne kontentigas. Jen vi finfine rezignas pri la lernado.

**S-ino Doris havis tre klaran bildon pri flueco**

S-ino Doris, avino de mia bofrato, komencis lerni la anglan tute memstare kaj memlerne kiam ŝi aĝis



Kiuj landoj studas kiuj lingvoj (Duolingo, 2018)

65 jarojn. Ŝia edzo diradis, ke tia klopodado ne prosperos al ŝi tial, ĉar maljunula kapo ne ŝaŭmas. Kvankam tiu parolturno ne estas internacia, tamen mi estas tute certa, ke vi komprenis ĝin.

Per la lernado de la lingvo ŝi deziris vojaĝi al anglalingvaj landoj kaj elturniĝi memstare surstrate, ĉe butikoj kaj kulturaj programeroj. Ŝia celo ne estis scipovi la lingvon por teoriaj diskutoj, negoco aŭ universitata studo. Ŝia bildo pri flueco estis tre nete strekita.

La lernado ja prosperis al ŝi. Ŝi vizitis Londonon kaj Novjorkon, pli ol unu fojon. Trapasis lingvoekzamenon kaj akiris atestilon pri lingvoscio. Mi mem heredis diversajn lernomaterialojn, kiuj apartenis al ŝi. Mi diras apartenis, ĉar s-ino Doris forpasis antaŭ multaj jaroj. Ŝia ekzemplo evidentigas la gravecon de ia bildo pri flueco kaj la fakton, ke ankaŭ maljunula kapo povas ŝaŭmi.

## Due: ne vi kulpas, kiam vi stumblas

Infanoj alproprigas ligvojn al si aplikante certajn strukturojn ĝeneralige. Nur pensu pri la sufikso “ist”. En la portugala oni rajtas diri “floriston”, sed tute ne “fenestrison” aŭ “seĝiston”, kiel en Esperanto. Tiun manieron procedi priskribis Claude Piron surbaze de tio, kion observis kaj skribis la sviso Jean Piaget (1896-1980).

Stumbloj estas neevitebla malglataĵo sur la vojo de lernanto de lingvoj. Stumbli signifas: vi ankoraŭ ne alproprigis al vi tion, kion vi pro natura emo ŝatus ĝeneraligi. Pro tio Claude Piron asertas, ke lernanto de lingvo similas al sportisto.

Prezentu al vi kurvojn kun obtakloj. Lerta sportisto, aŭ lingvolernanto, iras tiom da fojoj la saman vojon ĝis li fariĝas kapabla kure trapasi ĝin ĉirkaŭante aŭ saltante trans la obstaklojn. Li ade renkontas la samajn

lingvostumblojn ĝis li ekmastras ilin, tio estas, ĝis li pro ili ne stumblas plu.

Lingvoj estas lingvoj, ne matematiko (ankaŭ Esperanto). Pro tio lingvoinstruistoj unuanime asertas: pli gravas ofta, eĉ se mallonga kontakto kun la celita lingvo, ol longaj sporadaj kontaktoj kun ĝi.

### **Trie kaj laste: kuraĝu**

Mia unua eksterlanda vojaĝo okazis en 2008. Mi vizitis Argentinon por instrui Esperanton. Tiam mi ne regis la hispanan kaj iluziis min per tio, ke la kurso povus plene sukcesi. Kompatinda mi! Nun, rememorante la okazaĵon, restas al mi nur vei. Mi promesis al mi mem, ke mi revizitos la landon en la laŭvica jaro kaj denove instruos la lingvon, tiam en la hispana.

Nu, mi ne celis preparoli biologion, tiom malpli kosmotemojn. Mi celi sole nur preparoli Esperanton hispanlingve. Mi decidis krome, ke tio okazos precize post unu jaro, kaj ke mi vojaĝos kune kun mia edzino. Mi bildigis al mi eĉ kian koltukon mi surhavigos pro la vintro. Jen mia bildo pri flueco.

Mi lernis la lingvon tre diligente. Aĉetis gramatikon, literaturaĵon, skribis, notis, praktikis, arigis la necesan vortprovizon por povi preparoli Esperanton, ne alian temon.

Alvenis la nova jaro. Ni forvojaĝis, kaj mi havis la mision aĉeti rememoraĵon por iu mia onklino. Ŝi kolektis ĉiuspecajn strigofigurojn, porcelanajn, rokecajn, manfaritajn...

Hejme ŝi havis grandan ŝrankon kun vitropordo tra kiu eblis vidi centojn da strigoj.

Jen mi alvenis la ĉefurbon Kordobo, eniris butikon kaj eldiris mian peton. La vendistino alrigardis min tiel, kvazaŭ mi estus freneza. Mi indignis. Mi rediris mian peton kaj aldonis, ke kion mi petas, tion mi ĵus vidis en la montrofenestro ekstere. Ŝi diris, ke ne povas esti.

Okazis, ke mi petis ne strigon, sed laktukon. Per unu litero mi mem kaŭzis la tutan embarason. En la hispana strigon oni diras lechusa kaj laktukon lechuga. Nu, vi jam komprenis, kion diris mi al la vendistino en la butiko, ĉu?

Malgraŭ ĉio mi aĉetis la strigon. Kuraĝo signifas agi spite la riskon fiaski, spite la riskon ridindiĝi, unuvorte spite ion ajn cele al la rezulto: komuniki. Cetere, risko stumbli ĉiam sieĝos. Gravas komuniki. Gravas kuraĝi.

Pri kuraĝo mi ŝatas la sintenon de Brené Brown, usona esploristino. Ŝi publikigis la libron “La kuraĝo esti neperfekta”. Laŭ ŝi, kuraĝo signifas opinii sin sufiĉa, tia, kiel ni statas. Ĉu la lingvo mem ne estas tia? Neperfekta, neabsolute sufiĉa? Lingvo estas rimedo, ne celo.

Celon havu vi, t.e. bildon pri flueco. Ĉu vi jam skizis la vian? Se ne, kiam precize vi komencos? Kiam vi atingos ĝin, difinu alian! Kaj tiel plu.

S-ro Geraldo Mattos asertas, ke “lingvon lingvano neniam mastras ĝis vere plena posedo”. Ni aldonu: lingvon lingvano mastru ĝis vere plena sufiĉo por ĝui celon post celo. ■

# Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

## Demando

Kiu estas la diferenco inter ĉi tiuj du frazoj: *Sur la strato staris multaj homoj rigardantaj la ĉielon.*

— *Sur la strato staris multaj homoj rigardante la ĉielon.*

Ĉu ambaŭ estas ĝustaj?

## Respondo

Jes, ambaŭ frazoj estas tute ĝustaj, sed ne diras precize la samon. La unua frazo enhavas A-finaĵan participon, kiu rilatas al la substantivo *homoj*; ĝi esprimas la

ideon, ke ili estis en la stato rigardi la ĉielon. La dua frazo enhavas E-finaĵan participon, kiu rilatas al la verbo *staris*, kaj ĝi priskribas la manieron aŭ la cirkonstancon, laŭ kiu la homoj staris; tiun ĉi frazon oni povus alivortigi per: *dum la homoj staris, ili rigardis la ĉielon.* La diferenco estas nuanca.

Jen plia ekzemplo: *Lupo dormanta ŝafon ne kaptas (Proverbaro Esperanta).*

Alivorte: lupo en dormostato ne kaptas ŝafon. Se oni ŝanĝus *dormanta* al *dormante*, la frazo signifus: dum ĝi dormas, lupo ne kaptas ŝafon. Denove, la diferenco estas nuanca.



# Novaspeca Homaro, Ĉu?

PAULO P. NASCENTES<sup>1</sup>



Sencomanko estas por ni defio, minaco, instigo. Homa cerbo tute malŝatas ne kompreni strangan fenomenon. Antaŭ nekonata situacio traserĉas ĝi memoraĵojn cele eltrovi en pasinta sperto indicojn, spurojn, evidentojn pri regulo, modelo, ŝablono, minimume rekonebla. Alkutimiĝintaj al specifaj, sektoraj krizoj, homoj preskaŭ freneziĝas antaŭ novaspeca, tutmonda, planeda krizo, nome la pandemio kaŭzita de nevidebla malamiko, mutacianta viruso mortiganta amason da homoj. Kun ironia demokratio, ĝi infektas personojn el diversaj sociaj kondiĉoj, kredoj, ideologioj en landoj ĉu riĉaj, povaj, ĉu historie malriĉigitaj. Publika aŭ privata, sansistemoj simple kolapsas antaŭ niaj senpovaj kaj surprizaj okuloj.

Katastrofo, tragedio, torturo estas ripetataj vortoj en gazetaro. Aliaj vortoj kiaj *paradigmoŝanĝo*, *memtransformo*, *transiro al novaspeca*

*civiliza modelo* aperas pli modeste, ĉar ili ne vendas ĵurnalojn, ne furoras. Pensi tiel signifas akcepti kontuzan fiaskon de ĉiu modelo ĝis nun spertita de ĉiu lando, popolo, nacio. Kontraŭ la damaĝoj de tiu nova kronviruso, estas tute senefikaj pezaj armiloj, potencaj bomboj, danĝeraj kanonoj. Krom kolapso de sansistemoj, ankaŭ la tutmonda, interligita, kompleksa ekonomia sistemo bankrotas kaj minacas la homan vivon. Aliflanke, laŭdire, krizo ĉiam estas defio kaj oportuno. Aŭ ni ĉiuj kune lernos la krudan lecionon kaj leviĝos el cindroj aŭ ni ĉiuj pereos pro orgojlo kaj ignoro. Nia estas la elekto. Nia estas la oportuno, tiu selĉevalo preta por rajdado, kiu onidire nur unufoje paŝas antaŭ ni. Kion ni faros, kiun vojon popoloj kaj ŝtatestroj fine elektos? Tio ne estas simpla ludo, ĉar eble nia plej malfacila tasko estas interna, persona, memstara ŝanĝo. Famas frazo de Albert Einstein: “Kia mondo estas tia, kie estas pli facile rompi la nukleon de atomo ol antaŭjuĝon?” Kion do atendi kaj kion esperi?

Espero venos certe ne el la sama ofta pensmaniero, senlima konsumismo, egoa individuismo, senbrida natur-ekspluatado. Materiismo nin kondukis ĝuste al tiu

tutmonda ĥaoso. Materio estas videbla, sentebla, tuŝebla parto de Vivo. Arto, kulturo, eĉ bonfarto kaj sano estas nemateria aspekto de la videbla mondo. La koncepto pri sano evoluis. Unue temis pri “situacio de perfekta bonfarto fizika, mensa kaj socia de persono”. Tamen tiu “perfektecio” simple ne ekzistas. Necesas aldoni la dimensiojn animan (*psyche*), subjektivan, spiritualan. Hodiaŭ pli ampleksa koncepto diras, ke *sano estas statuso de modera harmonio inter la subjekto kaj lia propra realaĵo*. Tiel, ĉu oni povas nomi sana vivon kaj laborkondiĉojn en grandaj urbocentroj kun dekmiloj da enloĝantoj? Ĉu eblas trovi vere sanan individuon meze de malsana socio? Al kio reduktiĝas persono senigita de kreiva ena vivo, sen minimuma kontakto kun utopio, revoj, songoj, aspiroj, projektoj kaj vivocejoj? Kiel dirite, sencomanko estas nuntempe terura problemo ĉu persona ĉu kolektiva. Kie do kuŝas saĝa espero?

Espero venos pli probable el nia kreemo, novigo, imagopovo ol el nia racia cerbo apartigita el la pravigoj de nia koro, de nia konscienco. Aŭ ni kune unue ŝanĝos nin mem, nian mondovizion kaj sekve la mondon, aŭ nenio efektive ŝanĝiĝos. Aŭ nia devojiĝo estos refoje tortura, katastrofa, tragedia. Denove nin inspiru vortojn de Einstein: “*Neniu*

*problemo povas esti solvita de la sama konscienca stato kiu ĝin kreis. Estas bezonate iri pli foren.*” Vidu bone: Konscienco estas la ŝlosila vorto. Jam de la komenco de la deknaŭa jarcento ĝi aperas en la esploroj de konataj fizikistoj, kiaj Max Planck, Niels Bohr, Erwin Schrödinger, Werner Heisenberg, Amit Goswami. Eĉ se ekstermoda, estas tamen esplorinda, *mutatis mutandis*, kelkaj principoj formulitaj la deknaŭan jarcenton de L. L. Zamenhof, nome *Homaranismo*. Kompreneble, certe sana imunsistemo liberiĝis el la enkatenigo de *ismoj*. Alivorte, ne temas pri blinda adopto de kredosistemo deviga kaj ekstere devena, tute ne. Male, ene de pacigita koro espereble burĝonas de nun la delikata floro de novaspeca, profunda, egalrajteca mondovizio, ebliganta la alvenon de anoncita *nova erao* ne tamen kiel pluan filozofion, sed ja kiel nesuspekteman elkoran unikan etikon, superan al ĉio antaŭe konata. Ĉu vi emas al la plibonigo de la mondo? Ĉu vi pretas komenci per vi mem, per viaj ombraj aspektoj? Kiamaniere do vi intencas kunlabori rilate la altigon de la vibroj ene kaj ekster vi? Ĉu vi sufiĉe kuraĝas? ■

---

<sup>i</sup> Profesoro, poeto, preleganto, profesia vojaĝanto.



# Se vi estas humana, vi kompatas

**JOSÉ MAURO PROGIANTE**

“Senti kortuŝon pro ies malfeliĉo kaj deziron ĝin malakrigi.”

**T**iel la verbo “kompati” estas PIVe difinita.

Por la filozofoj, tamen, pli precizigus tiun difinon la ŝango de “kortuŝo” per “korpremo”, ĉar kompati estas senti suferon. Kompati estas suferi pro alies sufero, ne akcepti, ke iu ajn sufero estu inda je indiferenteco. Povas okazi, ke la kompatato suferas pro envio, ĵaluzo aŭ alia malbona sento, sed tio ne signifas, ke la kompatanto aprobas la motivon de lia sufero.

Kompreneble ĉiu sufero estas ĉagrena, inkluzive tiu de la kompatanto, kaj pro tio estas prave diri, ke kompatemo estas pruvo de humaneco. Nur homoj vere humanaj, tio estas, posedantoj de noblaj ecoj, toleras tiun internan atakon al sia propra komforto.

Neniu ŝatas suferi, eĉ se la sufero estas kaŭzata de kompatemo. Instinkte la kreitoj serĉas la plezuron. Eble pro tio Nietzsche kondamnis la

kompaton, dirante, ke ĝi kontraŭas la leĝon de evoluado, kaj rekomendis, ke oni forpuŝu ĝin.

La fakto estas, ke la rifuzo kompati estas ordinara sinteno inter la homoj, ĉar multe pli facilas senti plezuron ol doloron. Tamen ankaŭ estas fakto, ke multaj personoj havas moralan dilemon kiam sufero de aliulo skuas ilian animon. En tiuj momentoj, la racio pelas ilin al egoisma preteriro, sed samtempe tio pikas kaj hontigas ilin, ĉar sur la evolua eskalo ili jam atingis ŝtupon, kie ne eblas ignori sian humanecon.

Kompatato devenas de la latina *compassio* kaj ĝia ĝemela etimo estas la greka *sympatheia*, origino de *simpatio*, kies difino estas kapablo senti la samajn sentojn de alia persono. Diference de la kompatato, la *simpatio* ne ĉiam estas virto, ĉar eblas *simpatii*, ekzemple, kun iu, kiu faras kruelajon, kaj do kunsenti ties malamon.

Kelkaj virtoj, kiel la justeco aŭ la fideleco, aplikigas nur en niaj rilatoj



kun aliaj homoj. Tiusence la kompato estas pli ampleksa, ĉar ankaŭ la bestoj povas esti objektoj de nia kompatemo.

La vere humaneca kompato estas horizontala, tio estas, ĝi ekzistas inter egaluloj aŭ ĝi estigas egalecon inter ĝiaj partoprenantoj. Ĝia signo estas la respekto. Aliflanke, se anstataŭ respekto estas humiligo, eĉ se ne konscie kaŭzata, la kompato fariĝas vertikala, perdas sian esencon, kaj la kompatato sentas sin ofendita. Tio ofte okazas en amrilatoj, kiam la amo de unu el la paro velkas, sed li aŭ ŝi daŭrigas la rilaton pro kompato al la alia, kiu ordinarre reagas tiel: “Mi volas vian amon, ne vian kompaton.”

Indas konsideri ankaŭ la vidpunkton de la stoikistoj. Laŭ ili, “anstataŭ kompati la personojn, kial ne helpi

ilin, se eble?” Fakte, la deziro malakrigi ies malfeliĉon ne devas resti nur deziro. Kompato necesas, sed ne sufiĉas.

Kvankam alte staranta en la rondo de la virtoj, la kompato estas pli proksima al la egoismo, ol al la amo. Ĝi estas iom egoeca sento. Ni kompatas la aliulon ne nur pro lia sufero, sed ankaŭ pro tio, ke ni komprenas, ke estonte ni mem povos esti trafitaj de la samaj malfeliĉaĵoj.

La amo staras multe pli alte. Ĝi estas libereco, la kompato ankoraŭ ne. Aŭgusteno diris: “Amu kaj faru tion, kion vi volas.” Pri la kompato, eblas diri nur: “Kompatu kaj faru tion, kion vi devas.”



Libroj en Esperanto  
estas geniaj...  
vizitu...



**[easp.org.br/butiko](http://easp.org.br/butiko)**

# TVaerj denove aktiva!

En la kunteksto de la nuntempaj vivkondiĉoj pri socia malproksimiĝo, AERJ reaktivigas sian jutuban kanalon por kontribui al la esperanta kulturo. Kaj kunlabore, ankaŭ KarEJO kontribuos per virtuala evento.

La reinaŭguro okazis per publikigo de la prelego "**Historio de la Feminisma Movado**", farita de la junulino Karina Oliveira. Tiu estis la malferma programero de la 30-a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo de Rio-de-Ĵaneiro, okazinta en Majo 2019 sub la ĉeftemo *Virinoj de Esperantujo*.

Karina Oliveira doktoriĝas pri lingvistiko kaj estas vicprezidanto de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo) dum la periodo 2018-2020. La prelego ankaŭ ligiĝis al la moto de BEJO por la jaro 2019 "#levuvianvoĉon - alte kaj espere", kies celo estis pritrakti genran egalecon kaj partoprenon de virinoj en la Esperanto-movado. La prelego premieris en YouTube vendredon, la 5-an de junio je la 19-a horo.

Poste, je la 21-a, okazos esperanta retkunveno organizata de KarEJO (Karioka Esperantista Junulara Organizo). La **Babilado de KarEJO**, okazonta pere de la programo Zoom, pritraktos la temon

de la prelego kaj en ĝi partoprenos ankaŭ la preleginto.

Ligilojn kaj informojn pri la duobla evento oni trovas ankaŭ en la [anonco ĉe Eventa Servo](#)<sup>1</sup>.

## Informservo

Evento: Prelego "Historio de la Feminisma Movado" kaj Babilado de KarEJO

Dato: 5-a de Junio, 2020

Horaro: ekde la 19h (prelego) kaj ekde la 21h (babilado)

Loko: Rete

Ligiloj:

<https://youtu.be/g0ZfzGznQLM><sup>1</sup>  
retkunvena ID: [460 042 0792](#)<sup>1</sup>

Pasvorto: babiluni05

**A**nonco:  
<https://eventaservo.org/e/babiladokarejo> ■

<sup>1</sup> hiperligila vidteksto <https://aerj.us9.list-manage.com/track/click?u=f085f921bf70bd12c95b079b4&id=26eba1a773&e=aba786a683>

# Librorecenzo

**PAULO SÉRGIO VIANA**

“Ne eblas aplaŭdi unumane”.

Aŭtoro: Sten Johansson


Eldonejo Mondial

La svedo Sten Johansson estas fekunda kaj amata aŭtoro de tradukoj kaj originalaj verkoj en Esperanto. Entute, lia verkaro enhavas kelkajn dekojn da titoloj. Inter liaj tradukoj, sufiĉus menciigi la mirindan verkon de Selma Lagerlöf: *La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson* (2002), kiu estas juvela volumo. Persone, mi estis ankaŭ ravita de *Doktoro Glas*, de Hjalmar Söderberg.

Mi do mendis la lastan originalan romanon de tiu valora verkisto, el Eldonejo Mondial: “*Ne eblas aplaŭdi unumane*”. Mi ĝin legis per Google Play, sur la ekrano de mia tabulkomputilo, tute komforte kaj plezure, sed eblas mendi ankaŭ paperan eldonon.

En preskaŭ ducent paĝoj li detale priskribas la ĉiutagan vivon de juna sveda paro, kiu ekformas familion. Li estas svedo el irana familio, kaj ŝi, “normala” svedo. La rakonto fluas laŭ la vidpunkto de la viro, kaj lerte montras la malfacilecon fari ĝustajn elektojn en la momento konstrui familion.

Por brazilano, estas tre kurioze akompani la penadon de tiuj gejunuloj por establiĝo en la socia vivo, en medio tute malsama ol nia sudamerika medio. La aŭtoro tre lerte priskribas la rutinan vivon en sia lando, sed subtile priskribas ankaŭ la kreskantan streĉiĝon, kiu iom post iom kreskas en la amrilato de la geedzoj. Meze de la konata



sveda flegmo, bolas sentoj kaj kontraŭdiraj psikaj impulsoj.

Plej impresa en la verko, super la simpla intrigo, estas la lingvo. Esperanto tie aperas en plej pura, polurita formo. La stilo estas samtempe simpla, rekta kaj objektiva, kaj tamen mirinde esprimpova. La priskribo de mensaj statoj estas same trafa kiel la priskribo de fizikaj cirkonstancoj. Al la leganto ŝajnas, ke li spektas filmon. Vere plezura legado, kiu montras, ke ne necesas spektaklecaj historioj por konsistigo de bona romano. Almenaŭ duono de la valoro de tia verko sidas en la *maniero* kiel oni rakontas.

La novklasikulo de nia literaturo denove lasis al ni “lecionon” pri tio, kiel oni devas verki romanon. ■

**ANNA LOBO**

FILMORECENZO

## ĴOKERO

Originala nomo: Joker

Direktoro: Todd Phillips

Aktoroj: Joaquin Phoenix,  
Robert DeNiro, Za'ie Beetz

Lando: Usono

Lanĉo: 04.10.2019

Tempodaŭro: 122 min



Se vi volas filmon kiu vere skuas vin kaj renversas la manieron, kiel vi vidas la mondon, la filmo ĵokero estas por vi. Kompreneble ne estas por ĉiuj. Ĝi estas peza filmo, kun tre profunda psikologia kaj socia kerno. Vi bone trafas, se vi pensas ke temas pri la malamiko de komiksa superheroo Batman, sed el komikso ĝi ja efektive preskaŭ nenion havas.

Ĝi rakontas al ni, pri kiel Arthur Fleck iĝis la fama Ĵokero. Oni trapasas punktojn kiel la mona problemo, la humiligoj, la malsana panjo. Ankaŭ tie estas la rilato kun la humoro kaj rido, kiun oni iom post iom rimarkas ke ne estas io normala laŭ la socio.

Li klopodas adaptiĝi. Li faras sian taskon por provi eniri en la socion. En ia konservativa urbo nomata Gotham, en kiu Thomas Wayne -

patro de la infano Bruce Wayne, la estonta Batman - konkuras al estreco. Meze tio, Arthur sin montras kiel la bona persono, kiu bone zorgas sian panjon kaj akceptas ĉiujn batojn.

Ĝis kiam?

Ĉu tia stato devenas de socio jam malsana? Ĉu ena tendenco? Ambaŭ? Kio estas frenezeco? Kio estas normaleco?

Kiujn partoj de ni, ni taksas malbonaj? Kiuj juĝoj pri ni haltigas nin? Ĉu vi pretus esti plene vi mem, sen baroj aŭ difinoj aŭ antaŭjuĝoj? Kion vi pretus fari por ke nenio kaj neniu haltigu vin?

Ĝi spekteblas ĉe youtube, sed laŭpage. Mi kuraĝigas vin spekti ĝin, ĉar estas tre interesa sperto, malgraŭ ke tre intensa. Ĝis la sekva filmo! ■

LA BLUA  SONGÔ



J. M. Progiante



Autor: J.M. Progiante  
Editora: Esprima, 2019  
Formato: 19 cm, 60 páginas

Capa dura com ilustrações coloridas

Sequência do livro “La malbeno de Tarumo kaj Nurana” com os personagens reunidos, agora na Bélgica, para solucionar um novo mistério envolvendo o roubo de um diamante.

Preço: R\$ 39,00

EA VILAEBS  [esp.org.br/butiko](http://esp.org.br/butiko)

## VENU ĜI BELAN SEMAJNFINON EN LA PLAĜO



### Agado inter amikoj

Amikoj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo nuntempe starigas agadon por kolekti rimedojn kun la intenco pagi la kostojn de la sidejo de EASP. Por tio, ili starigas latumon de 3-taga gastigado por 4 personoj en ĉaleto bonege lokita, 200-metrojn for de la pramo (enirejo al la urbo Ilha Bela/SP), en loko kun vendejoj (apoteko, kafejoj, restoracioj kaj urbaj transportiloj, ĉio en proksimeco de 100 metroj). Oni provizas unu lokon por propra aŭtomobilo, etan kuirejon, televidilon, litkovraĵojn kaj bonkovraĵojn. La rezerva validas por la 12-a de oktobro 2020, kiam supozeble jam ne estas la kvaranteno. Oni lotumos 1 el 100 numeroj, kiu respondos al la 2 lastaj numeroj de la unua premio de la federacia Lotumo, en la 26-a de septembro (sabate) 2020. Ĉiu bileto kostos po 30 realoj, kaj oni povas aĉeti ĝin per la retejo de EASP ([easp.org.br/butiko](http://easp.org.br/butiko)).

